Saharo

Saharo estas la plej granda dezerto en la mondo. Ĝi ampleksas parton de norda Afriko ekde la Atlantika marbordo ĝis Ruĝa Maro tra 10 ŝtatoj (Egiptio, Libio, Alĝerio, Tunizio, Maroko, Maŭritanio, Niĝero, Ĉado, Malio kaj Sudano), plus la disputata teritorio de okcidenta Saharo. Kun surfaco de pli ol 9 000 000 km^2 ĝi okupas preskaŭ la saman areon kiel Ĉinio aŭ Usono.

La nomo *Saharo* venas de la araba traduko *Sahhra* de la tuarega vorto *tenere*, kiu signifas *dezerto* aŭ *sablo*. Alia teorio devenigas ĝin de *al-sahhra* aŭ *es-ssah-ra*, signifanta *flav-ruĝa*.

La Romianoj nomis la landon sudan de Kartago *Terra deserta* (forlasita lando), kaj dum la eŭropa mezepoko ĝi simple nomiĝis "granda dezerto". Nur ekde la 19-a jarcento oni plejofte uzas la nomon "Saharo".

La araba nomo estas *Bahr bela ma* (maro senakva).

La okcidenta parto de Saharo estas areo kun disputata posedanto - posedon de la Okcidenta Saharo proklamas kaj Maroko, kaj gerila Fronto Polisario, kiu celas establi tie sendependan respublikon de la Saharanoj.

En Saharo vivas plejparte tuaregoj kaj berberoj. Ekde la 7-a jarcento ekokupis Saharon armee araboj kaj ili disvastigis ĉi tie islamon, kio tre signife influis kulturon de lokaj ŝtatoj kaj iliajn interrilatojn. Sed necesas diri, ke Saharo estas plej dense loĝata sur norda ĉemara zono, kie estas grandaj urboj kiel Tripoliso, Benghazio, kie vivas ankaŭ eŭropanoj, kaj laŭlonge laŭ la tuta marbordo kondukas marborda aŭtostrado. Malpli grandaj urboj, kiel Sabrato, estas ankaŭ eĉ 400 km en enlando, en la profunda Saharo. La norda marbordo estas trateksita per romiaj memorigaĵoj.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Saharo